

### **KUNVOKO DE ĜENERALA KUNVENO DE MEL**

Konforme al la statuto de Madrida Esperanto-Liceo, la prezidanto alvokas ĉiujn membrojn por la ordinara ĝenerala kunsido okazonta la lundon 13an de januaro 2020 je la 18:00 (unua alvoko) kaj je la 18:30 (dua alvoko) en la sidejo de la asocio, strato Rodríguez San Pedro 13-3-7 de Madrido, por pritrakti la sekvajn aferojn:

- 1.- Raporto pri evoluo de la membraro
- 2.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la financa raporto 2019
- 3.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la buĝeto por 2020
- 4.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la Agad-raporto 2019
- 5.- Diskuto kaj eventuala aprobo de la Agad-programo por 2020
- 6.- Konsisto de la estraro
- 7.- Demandoj, petoj, proponoj
- 8.- Redaktado, laŭtleĝo kaj eventuala aprobo de la protokolo de la kunsido.

Se vi ne povos ĉeesti, memoru ke vi povas transdoni vian voĉdon-raĵton al alia ĉeestonta membro, pere de mesaĝo al: [madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es). Baldaŭ vi ricevos la diskutotajn dokumentojn. Kunvokas: La prezidanto, Manuel Parra.

**GRAVE:** Vi povas aliĝi al Madrida Esperanto-Liceo plenigante la aliĝilon kiu troviĝas en la fako "Dokumentoj" de la retejo de MEL: <http://esperanto.es/mel/index.php/dokumentoj-documentos>. La kotizo plu restas la sama, 12 eŭroj jare. Se vi estas malpli ol 30-jaraĝa, tio rajtigas rabaton por via kotizo al Hispana Esperanto-Federacio. La aliĝilon kaj la pagon vi povas efektiviĝi surloke la 13an mem dum la Ĝenerala Kunveno, aŭ alian tagon en la sidejo.

### **ZAMENHOF-TAGO EN MADRIDO**

Por celebri la 160-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, la sabaton 14an de decembro antaŭtage de la Tago de la Esperanto-Libro, kunvenis la esperantistoj de Madrido kaj ĉirkaŭaĵoj, laŭ invito de Madrida Esperanto-Liceo, La evento okazis, same kiel pasintjare, en



kulturejo Centro Sociocultural Mariano Muñoz, en la kvartalo Pradolongo-Usera.

MEL disponis la lokon ekde la 11a matene ĝis la 6a vespere. La programo estis sufiĉe varia. Pedro Hernández prelegis pri antikvaj lingvoj, Ana Manero pri la biblioteko de HEF, Félix Jiménez Lobo pri la kurso de UNED. Toño del Barrio proponis lingvan ludon pri kreado de vortoj; Juan del Castillo gvidis ludojn per iloj kaj kartoj. Pluraj el la ĉeestantoj manĝis kune en la kafejo de la centro.

Libroservo funkciis dum la tago. Ĉeestis ĉirkaŭ dudeko de homoj, kelkaj venintaj el najbaraj regionoj.

**INTERVJUO EN RADIO**

La 13an de decembro, okaze de la Zamenhof-Tago, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio estis intervjuita en la regiona radio de Madrido, Onda Madrid, en la programo “Buenos Días, Madrid”, gvidata de la veterana ĵurnalistino Ely del Valle. Ŝi kaj la alia kunprezentisto impresis kvazaŭ ili almenaŭ iom pretigis la intervjuon, kio ĉiam estas dankinda.

La pecon oni povas aŭskulti rete en la adreso: <http://www.telemadrid.es/programas/buenos-dias-madrid-om/Felican-Kristnaskon-9-2185671428--20191213123000.html>. La titolo de la paĝo estas “Feliĉan Kristnaskon”, tiel en Esperanto, ĉar la ĵurnalistoj profitis por demandi pri tiu esprimo en nia lingvo, por gratuli la festojn.

**VIZITIS KAJ VIZITOS NIN**

Dum la jarfinaj festoj vizitis la sidejon esperantisto el Vélez-Málaga, Fabián Jiménez, gvidanto de la kursoj pri Esperanto en mezlernejo de tiu urbo, kiu profitis la okazon unuafoje koni la lokon por rakonti pri sia sperto. Li krome koincidis kun Petra, nun loĝanta en Granda Kanario, kiu denove vizitis la sidejon post siaj vojaĝoj al diversaj lokoj de Esperantio.

Dum venontaj festoj de la Tri Magoj vizitos Madridon Elda Doerfler, esperantisto el Triesto (Italio), kunorganizanto de la pasintjara itala kongreso. Ni rendezvos kun ŝi la 8an de januaro, je la 6,30 vespere, en la trinkejo Pez-Tortilla, en la strato Pez, 36 (proksime al metrostacio Noviciado)

**KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ**

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Plej probable la 6an ĝi estos fermita pro la festo, sed atentu ke ni planas rendezvi tiun semajnon la merkredon en trinkejo, kiel oni menciis antaŭe. Krome, la sabata renkontiĝo okazos la 11an (duan sabaton), je la 6a horo, en Medialab-Prado, kiel kutime.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrid/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/).

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)